ENHAVO

“ĈE AKVORANDO”
romano de SHI Nai'an
kaj LUO Guanzhong
elĉinigita de LAŬLUM
legita de Eugene de ZILAH 4
EL VIAJ LETEROJ…
George BAKER 10
ŜAKPROBLEMO ‘ŜPB-123’
Algis KASPIRAVICIUS 10
LA DEVENO DE ISLANDANOJ
laŭ la sagaoj
Sigurdur PETURSSON 11
INTER INDIANOJ KAJ LA LUMOJ DE GUANAJUATO
sur la vojo de Guadalajara
al Usono-landlimo
Peter BROWNE 14
ĜISOSTE FRANCA, SED GUSTE PLI ĈINA
CHEN Jitong, pioniro de la kultura
interfluo inter Francio kaj Ĉinio
HU Guozhu 16
PROVERBO-ĈIFRO ‘PĈ-123’
Nora CARAGEA 18
LA EPOSO DE BRAVULOJ
eseo pri albanaj
epikaj tekstoj
Xhuma ÇUPA 17
SUR INSULO DEZERTA…
Christian DECLERCK 25
ILI DIRIS…
Bernard WERBER 28
LA PREMIO “KLARA SILBERNIK”
Jean AMOUROUX 29
“ARNE, LA ĈEFIDO”
rakonto el la vikinga epoko
de Leif NORDENSTORM
recenzo: Ginette MARTIN 30
KRUCVORTENIGMO ‘KVE-123’
MAGDA LENA 18
ĈU VI JAM SCIAS…?
pri la hispangla
pri tradukoj 30

15a-21a de julio 2006:
INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO en TIMISOARA, RUMANIO, pri la temo “Kio estas ORIENTO?”

numero 123 **3a de la 21a jaro** **15apr06**

Karaj Amikoj,

Ni multe vojaĝas en tiu ĉi nova *LG*… tempe, space, beletre. En la *Vortoj de la redaktoro* ni alteriĝas rekte en la Ĉinio de la 12a jarcento. Ni poste iros de preskaŭ arktaj regionoj al tute tropikaj: al Islando kun aventuremaj vikingoj, al Meksikio kun la eterne scivolema Peter BROWNE. Denove al la ĉina mondo sur la spuroj de fascina generalo-diplomato-verkisto CHEN Jitong. Per eseo de Xhuma ÇUPA ni eniras en la nordan Albanion por malkovri ĝiajn legendojn kaj ĝiajn mitajn heroojn. Eĉ Christian DECLERCK, kiu "vojaĝas precipe kaj prefere perlibre" (*LG120*), ne hezitas haste fuĝi al dezerta insulo, kun tri esperantlingvaj libroj.

Post tiom da vojaĝoj ne plu restis loko por recenzi aŭ prezenti librojn: tamen Sigurdur PETURSSON kaj Ginette MARTIN instigas nin legi pri vikinga kulturo; dankon al ambaŭ. Dankon ankaŭ al Jean AMOUROUX, kiu, okaze de la *Tago de la virino* la 8an de marto, sendis por tiu ĉi kajero paĝon pri nia esperanta mondo.

Grave! OSIEK-membroj ne forgesu sendi po du proponojn por la premio antaŭ la 1-a de majo !

Madeleine de Zilah